**N I A V O Ĉ O**
**Organo de Madrida Esperanto-Liceo**
**Atocha 98-4º. 28012 Madrid**
**Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz** **Setembro-Oktobro 1993**

# 78 U.K. DE ESPERANTO. VALENCIO.

Valencia situas orienten de Hispanio, apud la maro. La urbo havas preskaŭ 800.000 loĝantoj kaj estas ĉirkaŭitaj de oranĝarboj, kies blankaj floroj disvastigas en la aero somere mildan kaj dolĉan parfumon.

En tiu ĉi kadro celebriĝis ĉi jare, 1993, la 78-an U.K de Esperanto.

La preparado de la Kongreso estis longa kaj peza, sed fruktodona. La prezidanto de L.K.K, Sro Aŭgusto Casquero jam de longe spertis pri Kongresoj, ĉar en la lastaj 15 jaroj li organizis 3 naciajn Kongresojn: 2 en Madrido (1980, 1987), kaj 1 en Valencio (1988).

Sro Casquero vojaĝis al la 2 lastaj U.K por propagandi tiun ĉi de Valencio, por ricevi ideojn, por kontakti kun UEA, kaj ĉefe por studi kiajn programerojn plej ŝatis al Kongresanojn kaj kajn erarojn oni devas eviti. En la lasta, de Vieno, li vojaĝis kune kun la Konsilanto de Kulturo de Valencio, kiu kune kun la Hispana Ambasadoro en Austrio, transportis en Valencion la E-an flagon de la Viena U.K. Loka Kongresa Komitato atingis grandegan helpon de la urbestro de Valencio kaj de la Konsilanto pri Kulturo de la Valencia Regiono. Ankaŭ ĝi ricevis helpon el Komercaj firmaoj. Koncize, estis atingitaj senpage la Kongresejon, kiu estas luksega Palaco de Muziko; Koncerton de Muziko de la Simfonia Valencia Orkestro, unu el la plej prestiĝaj de Hispanio; 1.000 tutkolorajn afiŝojn; 2.500 dokumentujojn; inviton al giganta paeljo por la gekongresanoj, ktp ... Aferoj kiuj entute valoris pli ol 150.000 usonaj dolaroj (20 milionoj da pesetoj). Ĉio por favori al kongresanoj, ĉar kun tiom de helpoj, la Kongres-Kotizoj povus esti sufiĉe malmulteKostaj.

Malfeliĉe, centra oficejo de UEA ne korespondis al la entuziasmo de la Valencia LKK, kaj multobligis tiel la kotizon, ke duoniĝis la antaŭ-viditaj nombro da partoprenantoj, kaj malfacilegis la alvenon de Orient-Eŭropanoj, kiuj tradicie amase iris al la Esperantaj Kongresoj. La fina nombro de aliĝintoj estis ĉirkaŭ du mil.

Ĉiu kaze, kaj parolante pri la Kongreso mem kaj ĝia rezulto, ni ne dubas aserti ke ĝi estis grandega sukceso, kaj ke ĝi povus esti resumita en 3 vortoj

1.- **ETOSO** 2.-**DISKONIGO** 3.- **PROFESIECO**

1.- Rilate al **Etoso** kontribuis al tio la unika sperto transformi la interkonan vesperon, ĝenerale enuiga kaj sen aktivaĵoj, en bonveniga festo ĉe la strando, kun regalo al gekongresanoj de **giganta paeljo**, tipa manĝajo de Valencio tutmonde konata. Ankaŭ kontribuis, la ĉeesto de multaj gejunuloj kiuj kostante viglis la atmosferon kaj krome le mirinda vetero de tiu mediteranea urbo, kaj la partoprenema sinteno de multaj esperantistoj, kiuj jam en la du tagoj antaŭ la malfermo de la Kongreso, sinoferis por prepari la dokumentaron ...

2.- Rilate al **Diskonigo**, preskaŭ unu jaro antaŭ la Kongreso Sro G.C. Fighiera el Italio, Prezidanto de la Eldonejo Heroldo, skizis planon por Funkciigi **Gazetaran Servon**, antaŭ, dum kaj post la Kongreso kun realisma buĝeto, malfeliĉe duonigita de UEA. Oni atingis grandan sukceson en Gazetaraj Konferencoj de Madrido kaj Valencio, kaj tio interesigis multajn regionajn kaj naciajn amaskomunikilojn kiel Antena 3 T.V, Diario 16, EFE, Cadena Ser, Cadena Cope, Levante, las Provincias, kaj informagentejoj de pli ol 8 landoj. Al tio forte kortibuis la helpojn de la Madridaj Esperantistoj, de Hispana E-a Federacio kaj de la profesia ĵurnalisto Stefan Maul el Germanujo. Por la Kongresanoj funkciis perfekte le redaktadon de **Kongresa kuriero**, kies respondecon prenis 2 junuloj, respektive el Portugalio kaj Hispanio (A. Martins kaj M. Cruz). Aparte, ILERA, Internacia Ligo E-a. **Radio-Amatoroj** diskonigis U.K al pli ol 2.000 kontaktojn de la mondo.

3.- Rilate al **Profesieco** ni diru ke la planado de la **helpa reto**, ĉefe bazita sur Valenciaj Esp-istoj kaj kunordigita de la L.K.K estis bona, ke la Kongreso funkciis kun alta nivelo de partopreno, ke la ekzisto de **2 samtempaj Kongresejoj** ne malfaciligis la fluan marŝon de la programeroj, kaj ke danke al granda peno kaj entuziasmo de la fakaj asocioj en kunlaboro kun la L.K.K, tiu ĉi U.K povus esti deklarita kiel **"Kongreso de Kongresoj"**: Fervojistoj; Filatelistoj; Kuracistoj; Katolikoj; Komercistoj; Sciencistoj ... trovis forumon por kunsidi kaj disvastigi iliajn ideojn.

Apartan mencion meritas la **Infana Kongreseto**, Gvidata de C. Fettes kaj H. Fantom, kiu vekis la atenton de la amaskomunikiloj. Ĝi funkciis santempe ol la U.K en Alborache, montara vilaĝo 60 Km malproksime de Valencio. La 46 geinfanoj de ĉiuj rasoj kaj kontinentoj vivis unikan sperton de internacia kunvivado kaj interŝanĝo de kulturoj.

Alia interesega faka Kongreso estis tiu de **ILEI**, Internacia Ligo de Esperantaj Intruistoj, kiu Komenciĝis tuj post la fino de la 78 U.K. Ĝia aktivaĵoj, konsistantaj el altnivelaj diskutoj kaj prelegoj pri la instruista mondo kaj la rilato kun E-o, estis kunordigita de la brito Duncan Charters, nuna prezidanto de ILEI.

Aparte ni substreku la **Internacian Universitatan Kongreson** (IUK), kunordigata de Dr-ino M.R. Urueña, kie estis prezentataj je universitata nivelo disvastigaj sciencaj studoj pri diversaj temoj: Kemio; Astronomio; Novaj strukturoj por universitatoj; Novaj instrumentodoj; Hispana Literatura; García Lorca; ktp ...

El la **artaj progamoj** ni elstarigu la imponan **Nacian Vesperon**, Kun partopreno de blovorkestro de Valencio kaj folkloraj grupoj de tri diversaj Hispanaj Regionoj; la **tutmondan premieron de Kantato en Esperanto** fare de muzikisto P. Vilarroig, poeto M. Fernández, esperanta koruso Verda Stelo kaj simfonia orkestro de Valencio; la satirika kabaredo "fraŭlino Barlaston"; la deklamado de la vivo kaj verko de García Lorca, fare de poeto M. Fernández; kaj la monologa dramo de la aktorino G. Almanza, el kubo.

Pri **distraj aranĝoj**, ni diru ke gekongresanoj multe partoprenis en diversaj ekskursoj, tuttagaj kaj duontagaj; kaj ankaŭ multe ŝatis la bankedon kaj balon en palaco Xuquer.

Memorinda afero por la ĉeestantoj estis sendube la **Florbatalo**: tipa Valencia festo konsistanta el simpatia ĵetado de freŝaj floroj inter la publiko kaj diversaj folkloraj grupoj de Valencianoj tipe vestitaj sur platform-ĉaroj, kiu rivalas pri beleco, bunto kaj ornamo.

Speciale fieriga por la Hispanoj estis la rezulto de la **Belartaj konkursoj de UEA:** preskaŭ ĉiuj gravaj premioj estis gajnitaj de la nova generacio de aŭtoroj naskiĝintaj sub la klera ombro de majstro F. de Diego kaj nomita **"Ibere Libere"**. Du el ties membraro, Miguel Fernández kaj Jorge Camacho (tiu ĉi lasta, la plej juna membro de la Akademio de Esperanto), plukkolektis plurajn premiojn kaj menciojn.

Kaj por fini tiun ĉi rapidan kaj personan opinion pri la Kongreso, ni aldonu ke multe plaĉis al gekongresanoj ankaŭ la antaŭkongreso de Barcelona, kun interesaj vizitoj Esperantaj kaj turismaj, kaj krome la postkongresoj al Andalucio kaj Madrido. En tiu ĉi lasta urbo, la partoprenantoj de la vojaĝo ricevis en Madrida Esperanta Liceo ĉarman bonvenon de la lokaj Esperantistoj kiuj preparis por ili gustumadon de ĉampano kun etikedo "Esperanto", kaj aŭdo-vidan prelegon pri "Madrido tra la jarcentoj". Poste, sinjorino Puhova kaj sinjoro Bronŝtein, ludis rusajn kantojn, kaj s-ino Ĉokola, prezentis spektaklon de "Tradicia magio el Japanio". Por fini, ĉiuj ĉeestantoj kune kantis popularajn esperantigitajn hispanajn kanzonojn.

Juan Carlos Ruiz.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin).

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º Marde/jaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon: (91) 446 80 79

18-an de Oktobro je la 19.00 horo, en Atocha 98, Juan Carlos gvidos "Rondan tablon pri 78-a UK".

**FONDAĴO GRABOWSKI**

Mecenata de S-ro Adamo Goralski el la Kanariaj Insuloj, celas subteni kaj premii meritajn kulturajn aktivaĵojn ĝenerale, aparte por kuraĝigi junaj verkistoj. Pasintjare premiis al Jorge Camacho.

**HEROLDO SENPAGE**

La duabla aŭtuna numero de "Heroldo de Esperanto", kun detala ilustrita raporto pri la Universala Kongreso en Valencio, estos ekspedata senpage al ĉiuj, kiu petos ĝin per simpla poŝtkarto al la redakcio de la revuo (Via Sandre 15. I-10078 Venaria Reale (Torino)

**KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993**

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

1-a Internacia Kultura kaj turisma semajno. 9-16 oktobro. Sant Cugat del Vallés. Informoj: HEFA. Poŝtkesto 15027. 08080 Barcelono. Kelkaj liceanoj preparas vojaĝon

30-1 novembro. "Sekso en Esperanto".Barcelono. Organizas Kataluna E-junularo. (93) 798 24 19

11-14 novembro. 8-a Internacia Kultura E-Festivalo. Parizo.

4-7 decembro. 26-a Kataluna Kongreso de Esperanto. Alcudia (Mallorca). Kataluna E-Asocio (93) 716 36 33

79-a UK 1994.Seulo.
80-a UK 1995 Tampereo (Finnlando)
82-a UK 1997 Australio

**LIBROJ POR MEZA KURSO**

Andaluzia Esperanto Unuiĝo (Apdo 864. 29080 Málaga) vendas, po 4.000 pts inklude sendo-kosto, materialo por meza kurso: Gramatiko, historio de esperanta literaturo, historio de la movado, esperanta agado, kreu kaj daŭrigu (socia psikologio) kaj kapabligu nin pedagogie.

**HELPU AL MEL. AĈETU SIAJ VENDAĴOJN**

"Esperanto: fenómeno de la comunicación". Auld, W ... 1.300 ptj
"Historia del Esperanto en Madrid". Sanz, Lupe ...... 500 ptj
"Parolu Esperanton" Fernández Arroyo, J. ............ 650 ptj
T-ĉemizoj "Esperanto" .............................. 600 ptj
Adresaro de hispanaj E-grupoj ....sendu poŝtmarkojn po 100 ptj
"Datos acerca del movimiento esperantista".poŝtmarkojn 100 ptj
La prezo inkludas iva-on kaj sendokoston. Antaŭ pago necese pere de poŝtĝiro al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98. 28012 Madrid. Por libroj 20% rabato se oni aĉetas pli ol 5 eksempleroj. (pli ol 20 por T-ĉemizoj). NE SENDU ĈEKON.

**MADRIDANOJ GAJNIS UEA-BELARTAJN KONKURSON**

Dum UK-Valencio UEA premiis jenajn madridajn verkistojn:
Poezio: 1-a premio. Jorge Camacho. "Monologo kun Mediteraneo"
2-a Premio. Miguel Fernández."Iama am' aŭ sonĝo ĉiunokta"
Honora mencio.M. Fernández. "Poeto"
Prozo: 1-a premio. M. Fernández. "Ek al barikadoj"
Honora mencio. M. Fernández."Esencen persense"
Premio An-okin pri kanto: M. Fernández/Pedro Vilarroig. "Amtemo" kaj "Tarde".

**AĈETU "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato pro pli ol 5 eksemplerojn. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4º. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.**

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal

Speciale fieriga por la Hispanoj estis la rezulto de la **Belartaj konkursoj de UEA:** preskaŭ ĉiuj gravaj premioj estis gajnitaj de la nova generacio de aŭtoroj naskiĝintaj sub la klera ombro de majstro F. de Diego kaj nomita **"Ibere Libere"**. Du el ties membraro, Miguel Fernández kaj Jorge Camacho (tiu ĉi lasta, la plej juna membro de la Akademio de Esperanto), plukkolektis plurajn premiojn kaj menciojn.

Kaj por fini tiun ĉi rapidan kaj personan opinion pri la Kongreso, ni aldonu ke multe plaĉis al gekongresanoj ankaŭ la antaŭkongreso de Barcelona, kun interesaj vizitoj Esperantaj kaj turismaj, kaj krome la postkongresoj al Andalucio kaj Madrido. En tiu ĉi lasta urbo, la partoprenantoj de la vojaĝo ricevis en Madrida Esperanta Liceo ĉarman bonvenon de la lokaj Esperantistoj kiuj preparis por ili gustumadon de ĉampano kun etikedo "Esperanto", kaj aŭdo-vidan prelegon pri "Madrido tra la jarcentoj". Poste, sinjorino Puhova kaj sinjoro Bronŝtein, ludis rusajn kantojn, kaj s-ino Ĉokola, prezentis spektaklon de "Tradicia magio el Japanio". Por fini, ĉiuj ĉeestantoj kune kantis popularajn esperantigitajn hispanajn kanzonojn.

Juan Carlos Ruiz.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin).

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º Marde/jaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon: (91) 446 80 79

18-an de Oktobro je la 19.00 horo, en Atocha 98, Juan Carlos gvidos "Rondan tablon pri 78-a UK".

**FONDAĴO GRABOWSKI**

Mecenata de S-ro Adamo Goralski el la Kanariaj Insuloj, celas subteni kaj premii meritajn kulturajn aktivaĵojn ĝenerale, aparte por kuraĝigi junaj verkistoj. Pasintjare premiis al Jorge Camacho.

**HEROLDO SENPAGE**

La duabla aŭtuna numero de "Heroldo de Esperanto", kun detala ilustrita raporto pri la Universala Kongreso en Valencio, estos ekspedata senpage al ĉiuj, kiu petos ĝin per simpla poŝtkarto al la redakcio de la revuo (Via Sandre 15. I-10078 Venaria Reale (Torino)

**KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993**

La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

1-a Internacia Kultura kaj turisma semajno. 9-16 oktobro. Sant Cugat del Vallés. Informoj: HEFA. Poŝtkesto 15027. 08080 Barcelono. Kelkaj liceanoj preparas vojaĝon

30-1 novembro. "Sekso en Esperanto".Barcelono. Organizas Kataluna E-junularo. (93) 798 24 19

11-14 novembro. 8-a Internacia Kultura E-Festivalo. Parizo.

Speciale fieriga por la Hispanoj estis la rezulto de la **Belartaj konkursoj de UEA:** preskaŭ ĉiuj gravaj premioj estis gajnitaj de la nova generacio de aŭtoroj naskiĝintaj sub la klera ombro de majstro F. de Diego kaj nomita **"Ibere Libere"**. Du el ties membraro, Miguel Fernández kaj Jorge Camacho (tiu ĉi lasta, la plej juna membro de la Akademio de Esperanto), plukkolektis plurajn premiojn kaj menciojn.

Kaj por fini tiun ĉi rapidan kaj personan opinion pri la Kongreso, ni aldonu ke multe plaĉis al gekongresanoj ankaŭ la antaŭkongreso de Barcelona, kun interesaj vizitoj Esperantaj kaj turismaj, kaj krome la postkongresoj al Andalucio kaj Madrido. En tiu ĉi lasta urbo, la partoprenantoj de la vojaĝo ricevis en Madrida Esperanta Liceo ĉarman bonvenon de la lokaj Esperantistoj kiuj preparis por ili gustumadon de ĉampano kun etikedo "Esperanto", kaj aŭdo-vidan prelegon pri "Madrido tra la jarcentoj". Poste, sinjorino Puhova kaj sinjoro Bronŝtein, ludis rusajn kantojn, kaj s-ino Ĉokola, prezentis spektaklon de "Tradicia magio el Japanio". Por fini, ĉiuj ĉeestantoj kune kantis popularajn esperantigitajn hispanajn kanzonojn.

Juan Carlos Ruiz.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**
(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi **madridajn** esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletin).

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º Marde/jaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon: (91) 446 80 79

18-an de Oktobro je la 19.00 horo, en Atocha 98, Juan Carlos gvidos "Rondan tablon pri 78-a UK".

**FONDAĴO GRABOWSKI**
Mecenata de S-ro Adamo Goralski el la Kanariaj Insuloj, celas subteni kaj premii meritajn kulturajn aktivaĵojn ĝenerale, aparte por kuraĝigi junaj verkistoj. Pasintjare premiis al Jorge Camacho.

**HEROLDO SENPAGE**
La duabla aŭtuna numero de "Heroldo de Esperanto", kun detala ilustrita raporto pri la Universala Kongreso en Valencio, estos ekspedata senpage al ĉiuj, kiu petos ĝin per simpla poŝtkarto al la redakcio de la revuo (Via Sandre 15. I-10078 Venaria Reale (Torino)

**KOTIZO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO POR 1993**
La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol 1992. Bv. **sendi ĉekon po 2.000 ptjn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭdankon por via kontribuo al daŭrigado de MEL.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

1-a Internacia Kultura kaj turisma semajno. 9-16 oktobro. Sant Cugat del Vallés. Informoj: HEFA. Poŝtkesto 15027. 08080 Barcelono. Kelkaj liceanoj preparas vojaĝon

30-1 novembro. "Sekso en Esperanto".Barcelono. Organizas Kataluna E-junularo. (93) 798 24 19

11-14 novembro. 8-a Internacia Kultura E-Festivalo. Parizo.